

Johann Wolfgang von Goethe,

Roz' sur erikejo

tradukita de Konrad Matheus

Vidiĝis eta ruĝa roz'
de knab', sur erikejo.
Ĝi belis en matena ros'.
Hastis li al juna ŝos'
admiri ĝin kun ĝojego.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

Diris knab': "Mi rompos vin,
rozo sur erikejo."
Diris roz': "Dorn' pikos vin,
por ke vi ne forgesu min.
Al mi ne estu sufero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

Kaj knab' sovaĝa romp'is ĝin,
rozon sur erikejo.
En defend' roz' pikis lin.
Sed ve' kaj aĥ' ne helpis ĝin.
Venis sort' sen tolero.
Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz',
roz' sur erikejo.

*Traduko de la Germana poemo
"Heidenröslein" de JOHANN
WOLFGANG VON GOETHE
(*1749-08-28 - †1832-03-22) en
Esperanton de Konrad Matheus.*

*Arg-1022-2227 (2014-12-17
13:24:53)*

*S-ano Konrad Matheus loĝas en
Mühlenweg 20, D-33038 Nie-
heim, Germanio.*

Johann Wolfgang von Goethe,

La rozeto

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Knabo vidis – jen rozeto
Sur la kampo staras;
Bela, juna la floreto . . .
Vive kuras la knabeto,
Ĝojas, miras, flaras.
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

Knabo diris : « mi eltiros
Belulinon mian » ;
Floro diris : « vi foriros, –
Per pikiloj mi disŝiros
Tuj la manon vian ».
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

La sovaĝa knab' ridante
La rozeton prenis, –
La floreto batalante
Sin defendis pikadante,
Sed la sorto venis.
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

*Traduko de la Germana
poemo "Heidenröslein" de
JOHANN WOLFGANG VON
GOETHE (*1749-08-28 -
†1832-03-22) en Esperanton
de LUDWIG LAZARUS ZA-
MENHOF (Ludoviko Lazaro
Zamenhovo, *1859-12-15 -
†1917-04-14).*

*Arg-1022-2070 (2014-05-23
12:25:14)*

*Tiu ĉi Zamenhova poem-
traduko troviĝas en
[http://edu.i-lo.
tarnow.pl/esp/lern/
librejo/0012/0008.php](http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php).*

Johann Wolfgang von Goethe,

Heidenröslein

Sah ein Knab ein Röslein stehn,
Röslein auf der Heiden,
War so jung und morgenschön,
Lief er schnell, es nah zu sehn,
Sah's mit vielen Freuden.
Röslein, Röslein, Röslein rot,
Röslein auf der Heiden.

Knabe sprach: „Ich breche dich,
Röslein auf der Heiden!“
Röslein sprach: „Ich steche dich,
Dass du ewig denkst an mich,
Und ich will's nicht leiden.“
Röslein, Röslein, Röslein rot,
Röslein auf der Heiden.

Und der wilde Knabe brach
's Röslein auf der Heiden;
Röslein wehrte sich und stach,
Half ihm doch kein Weh und Ach,
Musst es eben leiden.
Röslein, Röslein, Röslein rot,
Röslein auf der Heiden.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas JOHANN WOLFGANG VON GOE-
THE (*1749-08-28 - †1832-03-22).*

Arg-1022-2069 (2014-05-23 13:04:27)

*La poemo troviĝas en [http://de.wikipedia.org/wiki/
Heidenröslein](http://de.wikipedia.org/wiki/Heidenröslein). Melodioj estas
aŭdeblaŭ en [http://ingeb.
org/Lieder/saheinkn.html](http://ingeb.org/Lieder/saheinkn.html).*

*La plej konata Melodio estas
tiu, kiun verkis Heinrich Wer-
ner. Pri tiu vidu la vikipediejon
[http://de.wikipedia.org/wiki/
Heinrich_Werner_\(Komponist\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_(Komponist)).*